

Matthias Claudius,
La stelrigardantino

tradukita de Manfredo Ratislavo

Dum ĉiuj homoj tie ĉi
jam dormas post labor',
la stelojn alrigardas mi
dum noktomeza hor'.

Iradas ili dise jen
Samkiel ŝafdar',
jen ankaŭ kiel perloj en
la vic'aŭ kiel ar'.²

Brilegas tuta la ĉiel',
majesta estas ĝi!
Min ravas tiu pur' kaj bel',
kaj ne satiĝas mi.

Ekzistas sub ĉielo ĉi
- ĝin sentas mia kor' -
ja bona io multe pli
ol ĝojo kaj dolor'.

Mi sur la liton ĵetas min
kaj ne ekdormas mi;
en mia sens' serĉante ĝin,
sopiras mi je ĝi.

...

²aŭ: la vico de stelar'.

*Traduko de la Germana poemo “Die Sternseherin” de MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1995-04.*

279-4 / Arg-408-806 (2007-04-24 10:09:10)